

ESPERANTO

★ TRIUMFONTO ★

Nova titolo post 1 januaro 1925: „Heroldo de Esperanto“.

Aperas dufoje en la semajno (merkredo kaj sabate). — Prezo de unuopa numero 0.20 sv. fk. aŭ egalvaloro.

Protaktantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa
W.M. Page, advokato, Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
I. Gili Norta, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank- kaj fabrikk-
direktoro, Kaunas.

N-o 225
17. 12. 1924

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.

Redakciaj kunlaborantoj:

H. Jung kaj M. Butin, L. K.

Administracio:

Horrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo pomenara
de duonsemajna ekspedado: egal-
valoro de 0.20 sv. fk., mendita per
loka poŝtoŝecio 0.15 sv. fk.;
de semajna ekspedado (du numeroj
kun): 0.15 sv. fk.

Anonprezo
po unucentimetra kolonero egalvaloro
de 2.— sv. fk. (antaŭpage 1.50 sv. fk.),
minimuma alteco 5 cm.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

Du filoj de Polujo - du granduloj de l' Homaro.

Henrik Sienkiewicz, la aŭtoro de mondfama „Quo vadis?“

Wl. St. Reymont, la literatura Nobelpremiulo de nunjaro.

Henriko Sienkiewicz.

(1846—1917).

La 26-an de oktobro la varsovia loĝantaro ĝuis grandan honoron: alveno de l' korpo de l' tutmonde konata aŭtoro de „Quo Vadis?“

Henriko Sienkiewicz famigis Polujon tra la tuta mondo. Ne multaj estas la kampoj, sur kiuj nia lando povus fieri antaŭ la Okcidento. Terure senkompate katenadis Polujon la sorto, kaj ne favoraj estis la cirkonstancoj, por ke sur nia tero povu kreski eminentuloj. Ne granda tial estas ilia nombro.

Unu el tiaj nemultnombraj estis Henriko Sienkiewicz.

Kaj sur la tuta terĝlobo tia grandeco estas rekonita.

Svisujo, kie lia korpo ripozis ĝis nun, akompanis tiun grandan polon al lia patrujo kun plej solena pompo kaj honoro.

Aŭstrio, tra kiu veturigis la vagonaro tiun eminentan mortinton, faris al li plej ovacian akcepton kaj plej altajn honorojn.

Ceĥoslovakio invitis sin mem, ke oni sur ĝia tero permesu festi la kelkajn mallongajn horojn, dum kiuj la korpo de Sienkiewicz pretreveturu tie troviĝis.

Jugoslavio kaj Bulgarujo delegis specialajn honorulojn por partopreni la plej pompan ceremonion, kiun travivis iam ajn Polujo.

En Varsovio mem dum la transveturigo de l' korpo de la stacidomo ĝis S-ta Johana preĝejo (kie ripozas la korpoj de l' polaj merituloj) sin prezentis la konsuloj de ĉiuj eŭropaj ŝtatoj.

Grandega, multnombra kaj ĉiufanka estis la honoro, evidentigita al tiu granda filo de Polujo.

Kiu do estis Henriko Sienkiewicz?

En la jaro 1846 (4 majo) naskiĝis en Podlasie ĉe Josefo kaj Stefanino naskita Cieniszowski la estonta famo de Polujo, Henriko. Lia studojn (elementan kaj superan) li faris en Varsovio. Dum siaj studentaj jaroj li per nenio speciala distingis kaj ne partoprenis en ia societa nek studenta vivo. Malgrasa, malsanema, en la aŭditorio malofte vidata, li turnis je si tiel malgravan atenton ke, kiam post la fino de l' universitato iu el liaj amikoj komunikis, ke Sienkiewicz skribis belan romanon („Na Marne“), ĉiuj eksplodis per ridado.

Tamen tiu nerimarkito, edukita en tradicioj nobel-milifistaj, alportis kun si en la mondon du ecojn, kiuj garantiis la forton de lia grandioza talento: sentimenton kaj konscion pri realeco. Sola sentimonto eble donus al li flugilojn de romantismo, ŝanĝus lin en mistikulon; sola realeckonscio farus el li senaniman naturiston. La kuneo de tiuj du kvalitoj faris el li perfektan pentriston de l' mezo de la nacio, de ĝia historia reprezentado, de l' nobelaro.

Sienkiewicz ne estas profeto, nek filozofo, nek viro de l' popolo. Li estas artisto, pentristo, civitano-nobelulo, kiu rigardas kaj ĝigas nin rigardi la esintecon. El tiu lia eco fluas la mondfama „Quo Vadis“, „Krucanoj“, „Per fajro kaj glavo“, „La diluvo“ kaj „S-o Wołodyjowski“, majstroverkoj, kiuj famigas kaj lin kaj lian nacion en ĉiuj anguloj de l' terĝlobo.

Kiel artisto kaj psikologo Sienkiewicz okupas evidentan lokon inter la eŭropaj skribistoj, kaj liaj verkoj formas novan fazon en la evoluo de l' arta romanskribado.

Komencas Sienkiewicz sian literaturan karieron per malgrandaj noveloj, kiuj baldaŭ havigis al li famon de treege talenta verkisto (en „Przegląd Tygodniowy“). Neordinara observemo, intuicio kaj plastiko, disvolvita ĝis plej alta grado, precipe en pentrado de naturoj sentimentaj kaj sent-

emaj — estis la principaj ecoj, kiuj turnigis al li ĉies atenton. En 1873 li skribadas felietonojn en „Gazeta Polska“ sub la pseŭdonimo „Litwos“ kaj distingigas per siaj trafaj rimarkoj. En 1876 li entreprenas grandan vojaĝon tra Eŭropo kaj



Wl. St. Reymont

Henrik Sienkiewicz

Ameriko. Al tiu tempo apartenas liaj konataj „Listy z podróży“ (Leteroj el la vojaĝo).

Post kiam lia nomo jam estis sufiĉe konata en Polujo dank' al multaj bonaj verkoj („Humorajoj“, „El la not-libro de poznanja instruisto“, „Skizoj per karbo“ ktp.), Sienkiewicz surprizas la polan publikon per sia grandioza trilogio, bazita sur la fono de l' pola historio en XVII-a jarcento („Per fajro kaj glavo“ — pri la kozakaj militoj, „La Diluvo“ — pentras la svedan invadon, kaj „S-o Wołodyjowski“ — aventuroj de tiu kavaliro dum la milito kun la turkoj). Ĉiuj ĉi tri verkoj, skribitaj per stilo neimagebla artisto, posedas tiajn neordinarajn kvalitojn, ke ili apartenas al la plej famaj histori-romanoj en la pola literaturo. Dank' al sia intuicio la aŭtoro bone penetris en la naturon de l' personoj kaj akcidentoj de l' XVII-a jarcento kaj priprenis ilin kun eksterordinara bildeco kaj plastiko, vidigante tiamaniere al la leganto vicon da figuroj majstre desegnitaj.

En 1891 Sienkiewicz refoje vojaĝas. Tiu ĉi foje li post vizito al la tuta kontinento veturas Afrikon por ekkoni Egiptujon kaj Zanzibaron.

Unu el liaj plej lastaj historiaj kaj plej mondfamaj verkoj estas „Quo vadis?“, kiun li ĉirkaŭ 1900 publikigis. En belegaj koloroj li pentras la malmoralecon de l' antikvaj romanoj de l' tempoj de Nerono kaj la modestecon de l' sin en kajakombaj kaŝanta, sed havanta antaŭ si estontecon kristana mondo. Al la neordinaraj kvalitoj de tiu verko apartenas la bona kono de l' historio, perfekta pentrado de personoj individuaj kiel tipoj kaj karakteroj, kies psikologion la aŭtoro bone komprenis kaj scipovis respeguligi per sia kutima plastikemo, fine la belaria formado de certaj scenoj.

Tradukite en multajn aliajn lingvojn, tiu ĉi verko liveras al la aŭtoro tiom multe da famo, ke Sienkiewicz fariĝas eminentulo internacia, kaj oni komencas tradukadi ĉiujn liajn aliajn verkojn. Tiu diskonigo havigis al li en la jaro 1906 la premion de Nobel, kio estis ne nur por li sed ankaŭ por tuta lia nacio grandega honoro (la unua polo nobelpremiita).

Por fini kun liaj historiaj verkoj, ni devas citi la romanon „Krucanoj“ (La krucano), kie la aŭtoro metas antaŭ ni belegan galerion de tipoj kaj karakteroj, kaj arte karakterizas la hejman

vivon de l' nobelaro en la komenco de l' XV-a jarcento.

Krom siaj historiaj romanoj, Sienkiewicz donacis al ni ankaŭ serion da belegaj modernaj romanoj. Liaj „Sen dogmo“ kaj „La familio Polaniecki“ estas verkoj de unuaranga valoro, kie la aŭtoro okupas sin nur pri la psikologio de l' personoj, ne turnante atenton je laj demandoj aŭ aferoj sociaj. Tio ne estas tipoj speciale polaj, nur ĝenerale-eŭropaj. En la unua verko („Sen dogmo“) la aŭtoro donas al ni finskulptitan tipon de homo sen volo, nekaptabla al ago, Hamleton niatempan, kiu tute submetas sin al momentaj impresoj kaj ĉiam filozofias, penante justigi antaŭ si mem la mankon de energio kaj agokapablo. En „La familio Polaniecki“ ni vidas grupon da homoj fermitaj en malvasta rondo de familia vivo, kaj tamen treege tipaj kaj de l' aŭtoro lumigitaj per simpatia flamo. Ankaŭ tie ĉi Sienkiewicz estas majstro per siaj analizoj de l' homa animo kaj per uzado de teknikaj rimedoj por krei belegan tuton kiel artaĵon.

Ne malpli artisto prezentas sin Sienkiewicz en siaj noveloj. Liaj skizoj kaj leteroj, kaj unuavice la „Janko muzikanto“ (tradukita Esperanton) estas veraj majstraĵoj.

En la jaro 1900 la dankema patrujo donacis al li kauce de l' jubileo de lia literatura agado belan terpecon Obłęgorek, kie li ofie verkadis siajn felietonojn.

En la jaro 1914 Sienkiewicz ree forlasas sian patrujon. Tiufoje — lasfoje! — por ne plu reveni viva. En Svisujo li eklogis kaj de tie konservis la plej intimajn rilatojn kun sia patrujo. Li fondis la „nacion komitaton“, kiu ekde 1916 funkciis por esti en ĉama kontakto koncerne la polajn aferojn kun la Entento. Li mem estis prezidanto de l' komitato (vicprezidanto estis s-o Paderewski, la fama pianisto) kaj servis sian patrujon multege per siaj politikaj helpoj. En 1917 li mortis. Sur fremda tero. Ne ĝisvivinte la grandegan momenton, kiam la idealo de liaj revol., lia patrujo, fariĝis tute sendependa.

Ne forgesis pri li la patrujo. La 26-a de oktobro estas ties plej bona pruvo.

Pola Instituto de Esperanto.
Edvardo Wiesenfeld LK.

Wl. St. Reymont.

En 1868 jaro (la 6-an de majo) en vilaĝo Kobile Wielkie (tiam Petrokova gubernio) naskiĝis Władisław Stanisław Reymont. En sia juna aĝo li pasis diversajn peripeziojn, kaj tio ebligis al li plej diversflanke ekkoni la vivon. Kelkajn fojojn li estis fervojoŝicisto, dank' al kio li loĝadis ofte en malmulte loĝataj lokoj. Tiam li komencis skribadi novelojn, ĉerpante materialojn ĉefe el la vivo de kampuloj, kaj ekde 1893 publikigante ilin en diversaj ĵurnaloj. En 1894 aperas jam liaj apartaj verkoj (Pilgrimo al Jasna Góra). Poste: Komediantino (1896), Fermentoj (1897), La promesita tero (1898), Lili (1899), Tro malfrue (1899), Juste (1900), En aŭtuna nokto (1900), Antaŭ tagiĝo (1902), El taglibro (1905) k. m. aliaj gravaj verkoj liveras al li tre grandan famon.

Sed plej altan honoron, plej nemezureblan famon akiras Reymont per sia majstroverko Ĉiĥopi (La kampuloj), verko eldonata dum la jaroj 1904—1906. Kvar volumoj formas ĝin: 1. Aŭtuno, 2. Vintro, 3. Printempo, 4. Somero.

Sed ni iru laŭorde:

La unuaj noveloj de l' aŭtoro (aperintaj en volumo sub titolo: La renkonto) vidigas jam kuragon kaj senkondiĉan sincerecon. En sia indi-

vidua pentrado de l' morto, malsato de kamfio, de provincaj aktoroj li povas konkuri kun Zola kaj Maupassant.

Kun granda arto estas priskribitaj la karakterizoj de tipoj kaj de la kolektiva animo de l' popolo en „Pilgrimo al Jasna Góra“. Same individua, sed iom skeptikiginta, li lernas ĉion ekkonni, ĉion eksentri ĝi tio dedukti la filozofon de indulgemo kaj ekamo.

La „Komediantino“ kaj „Fermentoj“ sugestis verki la ampleza sentado de l' naturo kaj de l' elementaj fortaj individuoj. La samon pli malpli oni povas diri pri „La promesita tero“.

Ni devas memori, ke Reymont en sia skribado ne estis plene libera. La tiama cenzuro rusuja multege lin ĝenis. Kaj tial multaj el liaj verkoj povus eble ŝajni ne kompletaj, ne ĉiufanke el-laboritaj.

Kio al Reymont liveris la Nobel-premion, estas ĝuste lia plej granda verko, la kvarvoluma majstro-ajo sub titolo „La Kampuloj“ (Chłopi).

Jen verko, en kiu la aŭtoro levigas ĝis plej alta, ĝis plej lasta vorto de l' arto. Kun majstra plastikeco li donis al ni la vilaĝon. La polan vilaĝon. En tiu ĉi senco, la verko estas vere homera. Admirindaj estas la freŝeco de l' impresoj, la konvekseco de l' priskriboj, la pitoreskeco en traktado de ĉiu objekto. Ĉu en priskribo de l' dancoj — ĉio abundas je apartaj belecoj, ĉu en la natur-vivo — kia riĉeco de diversecoj kaj nuancoj, ĉu en la bild-galerio — kiom ili estas! Kaj ĉiu vivas per aparta plenece de sia vivo. Kiel ĉe Zola la kampulo estas pure franca, ĉi tie li estas trae pola. En ĉiu plej malgrava moveto evidentiĝas lia poeco. Li eĉ ne gratiatas sin ne pole. Vere minejo neelĉerpebla da popola psikologio. La printempo, somero, aŭtuno kaj vintro estas la ritmo de l' patrino-tero, kaj ankaŭ tiu de l' kampulo. Trapenetris tiu ritmo ankaŭ Reymont' on, kiu ĉion el la popolo elĉerpis, ĉiujn morojn, ĉiujn kutimojn, ĉiujn karakterojn, ĉiujn pensmanierojn, eĉ la lingvon mem, la idiomon. Ne povis sin elŝiri la aŭtoro el tiu atmosfero kaj la tutan verkon skribis ĝuste en tiu idiomo, kompletigante tiamaniere ĝisfine la belecon de l' verko, same kiel estetikulo penos, ke kun lia bela bildo plene harmoniun la kadro.

Epopeon en homera stilo donis al ni Reymont.

Kion diras al ni „La kampuloj“!

La verko estas plenelele objektiva. Nek la amon, nek malamon la aŭtoro evidentigas. Lin interesas nur la eksteraj formoj de l' estado, kaj tiujn li pentras majstre. Kaj ĉiujn egale. La plej belejal pejzaĝoj, la senkonsciaj ekstazoj erotiĉaj, la morto de l' malfeliĉa Kubo (Janĉjo), kiu mem dehakis al si la kruron por ne iri en la hospitalon, la okazintaĵoj kun la mortinta bovino, la buĉado de l' porkido kaj la neordinara morto de Boryna — ĉio aparte prezentas majstran finverkon.

Ni ne vidas tie ĉi la teron kiel potencon kosman aŭ ekonomian, kiu pezus sur la homo (ĉi ekz. ĉe Zola) kaj formus lian animon kaj vivmanieron; ni ne vidas la teron kiel aferon nacian. Generale ni nenion vidas. Kaj nenion diras

Rakonto,

kiun neniu bezonas kredi.

De Timm Kröger.*

Ne estas tro malproksime . . . post unutaga vojaĝo kaj gaja sono ĝi jam estas tie, sciu ĉe Kriŝan Sempelman, . . . ĉiam rekte suden ĝis la lima barilo de l' fabela lando, poste maldekstren kaj laŭ la nazo. Vi atingos urbon; tiun trairu. Post ĝi estas erikejo; tiun trapasa. Fine vi ekvidos abaron; trans la arbaro loĝas Kriŝan Sempelman.

Kriŝan Sempelman iam studis leĝosciencon kaj estigis fidel saĝa, ke li rezignis sukcesen en ekzamenon, sole por ne hontigi la profesorojn. Tiamaniere li restis saĝa, fraŭla kaj sendependa.

Kion mi rakontos, estis iam, — mi ne scias kiam. Kriŝan Sempelman havis serviston, nomatan Johano, hundon, nomatan Hektoro, kaj kuiristinon, nomatan . . . sed per la nomo de l' kuiristino ni ne ŝarĝu nian cerbon, ĉar koncerne ĉi tiun rakonton ĝi estas sen intereso.

Kriŝan Sempelman ne opiniis malsaĝaj sin kaj sian Johanon, — nepre ne! — sed sian kvar-piedulon li juĝis pli saĝa ol ilin ambaŭ.

„Johano, — li ofte diris — Hektoro nin superas. Estas domaĝe, ke ĝi ne scias paroli. . . he, he, kiajn aferojn ĝi rakontus!“ Tiel laŭdate Hektoro enŝovis sian malvarman nazopinton en la kavan manon de sia estro, ekternis kaj per la vosto balais polvon kaj papercerajn sub la sofono. Johano, pli malsaĝa ol Hektoro, sed estro de la lingvo, respondis: „Jes, Hektoro estas pli saĝa ol ni ĉiu.“

Ĉiumonate Johano, akompanate de Hektoro, veturis urbon. Dum Johano plenumis aferojn, la hundo gardis la veturilon. lufoje la honesta

al ni la verko. Nur de temp' al tempo al ni ŝajnas, kaj sufiĉe malofte, ke la homo kunfandigis kun la tero kaj formas kun ĝi unu grandan elementon naturan. Efektive tamen tiel ne estas. La naturo vivas, suferas, ĝojas kaj ĝargenas aparte kaj la homo aparte. La temp' kaj labor' de l' kampulo pasas sur la fon' de l' naturo sed ne estas kun ĝi organikaj ligitaj.

La verko ne povas ne postlasi grandiozan impreson. Kaj jam en la unuaj jaroj post sia apero ĝi estis tradukita rusen, poste germanen k. a. Kiel ne esperanten? Eble iu volus provi . . . Sed kiel esperantigi la idiomon?

Post „Kampuloj“ Reymont skribis ankoraŭ verkojn. Sed neniu el ili superis (eĉ ne egaligis) tiun majstroverkon, kiu plej certe jam estas la limo de la talento.

Nun li estas okupita per verko de grandiozaj teatraĵoj kun mistikaj bazoj kaj unu kinematografia dramo.

La esperanta literaturo bedaŭrinde kalkulas en sia katalogo ne multe da verkoj reymontaj. Nur kelkaj noveloj tradukitaj de D-o Leono Zamenhof kaj Kabe (Ave patria, En fumejo de l' opio, El la konstituciaj tagoj).

Sed ni esperu, ke tio ankoraŭ venos.

Pola Instituto de Esperanto
Edvardo Wiesendorf, L. K.

Ni dronas.

Ni dronas en manuskriptoj, malgraŭ la duonsemajno de nia jurnalo. Tio estas, ne la nombro de la manuskriptoj estas tro granda, sed la unuopaj manuskriptoj estas tro longaj. Oni babilas tro multe, kaj en la amaso da vortoj perdiĝas la ĉefaĵo. Ĉiam denove ni devas peti, kaj — se necese — postuli: Estu koncizaj en viaj raportoj kaj artikoloj! Reduktu la amplekson de viaj manuskriptoj al plejebla minimumo! Ne la longeco, sed la enhavo valorigas raporton aŭ artikolon. Imagu, ke nia jurnalo povus enhavi duoblan nombron da raportoj kaj artikoloj, se ĉiu unuopa raporto aŭ artikolo havus nur duonan longecon!

Kelkaj legantoj skribas: Forigu tute la pri-esperantan parton aŭ malgrandigu ĝin ĝis preskaŭa nuleco! Tio estas neebila en la nuna stato de nia movado. Tre gravaj estas ankoraŭ la Oficialaj Sciigoj, la Kroniko, la Bibliografio, la Libera Tribuno, la artikoloj pri propagando ktp. Sed ĉio povus kaj devus esti pli konciza. Oni diru nur la plej gravan, la ĉefaĵon, kaj forlasu la flank-aĵojn, la negravaĵojn.

Ankaŭ en artikoloj pri ne-esperantaj aferoj oni atentu pri plejebla koncizeco. Tradukante pri afero, pri kiu oni havas du artikolojn divers-longajn, oni elektu la malpli longan! Verkante artikolon originale en Esperanto, oni dependas ja de sia propra bonvolo koncerne la amplekson.

Do, estu en ĉio plejeble konciza, ne diru superfluaĵojn! Tiam ni ne bezonos ĉiam plendi pri manko de loko, kaj vi ne havos kaŭzon por plendo pri ne sufiĉe interesa enhavo!

T. J.

Johano revenis sen Hektoro. Mi tuj rakontos pro kio: la honesta Johano vendis Hektoron je alta prezo kaj, metinte la monon en sian poŝon, li elpensis ideon kiamaniere trompi sian sinjoron . . .

Kian senkulpan mienon li montris, kiam je lia reveno la sinjoro demandis pri Hektoro, — kian senkulpan kaj honestan mienon havis la bona Johano!

Dum la unua minuto li jen grimacias jen ridis aŭ tusetis gratante sian kapon; dum plia duono de minuto li povis nur baluti: „Estas tro malsaĝe!“

„Kio estas malsaĝa?“ — demandis Kriŝan Sempelman.

„Mi preskaŭ ne kuraĝas paroli pri tio. Vere, ekzistas strangaj aferoj en la mondo! . . . Hektoro eklernos . . . la studadon.“

„Kian sensencaĵon vi babilas?“

„Ĉu ne vere? Efektive tio kvazaŭ estas . . . oni ne trovas la ĝustan esprimon . . .“

„Parolu, Johano!“

„Jes, sinjoro, — kaj nun li komencis: — „hundoj . . . saĝaj hundoj . . . oni povas apenaŭ kredi tion, . . . oni instruas ilin . . . saĝaj hundoj lernas — paroli. Universitatoj nun ekzistas por ili, — akademioj por hundoj. Tia estas ankaŭ en la urbo. La plej supera el la profesoroj renkontis nin en la bazaro. Ekvidinte Hektoron li tuj ekkris: Jen estas iu, kiu kapablas! Homo, de kie vi havas la hundon? Vi nepre devas doni ĝin al mi, — ĝi vizitos la akademion! Komence mi ne konsentis, — daŭrigis Johano — sed li parolis kaj parolis. Mi ne sciis kiel helpi min, . . . fine mi fordonis Hektoron . . . je provo por kvar semajnoj. Li devigis min, li uzis superforton. — Cetere tio kostos nenion; estas honora afero por la akademio, ĝin klerigi. Tie Hektoro fariĝos respektindulo.“

Ekbolis kolero en la koro de Kriŝan Sempelman. Li estus interrompinta Johanon, sed ne . . . Germanismo, kiun mi intence ne internaciigis, por ne difekti la intencitan nuancon de l' aŭtoro. La ordinara senco estas: „Estas tro malgrava!“ (Rim. de l' trad.)

Socia vivo.

Progreso de internacia labora leĝfaro.

Rapida progreso daŭre fariĝas je efektiveco de la decidoj de la Internacia Labora Konferenco en la nacia leĝdono de diversaj landoj.

Ĝis 21 oktobro 1924 fariĝis 141 konfirmoj de Internaciaj Laboraj Leĝoj.

Estas interese noti, ke la Konvencio, kiujn la plej granda nombro da landoj konfirmis, estas la jenaj: tiu pri senlaboreco (17 landoj), tiu pri nokta laboro de virinoj (13 landoj) kaj tiu pri nokta laboro de junuloj (13 landoj).

Filatelo.

Danujo.

Okaze de 500-jara jubileo de dana poŝto aperis 1. 12. serio de jub. markoj: 10 oeroj verda, 15 o. viola kaj 20 o. bruna; desegno sama por ĉiuj valoroj: bildo de reĝoj Christian X kaj Christian IV, la vizaĝoj turnitaj dekstre aŭ maldekstre. La kvaroj de tiuj ĉi markoj estas certe raraj, ĉar ili montras: Chr. IV dekstre turnita, Chr. X maldekstre, Chr. X dekstre, Chr. IV maldekstre. Sekve estas entute 12 div. markoj. Ili aperas nur dum dec.—jan. En la kadro staras supre la valoro, sube Danmark, maldekstre 1624, dekstre 1924. Ankaŭ la kristnaska bonfarmarko memorigas pri la jubileo.

Radio.

„Radio-Welt“ por Esperanto.

En sia kajero 58 de 22. 11., radio-revuo „Radio-Welt“ en Vien enhavas ĉefartikolon „Esperanto, la mondhelpiligo de Radio“, de A. R. Burrows, programvidanto kaj direktoro de Brita Brodkasto (B. B. C.) en London. Esperebla la radio-stacio de Vien baldaŭ sekvos la bonan ekzemplon de multaj stacioj en Germanujo, disaŭdigonte esp. kurson.

Esperanto ĉe Radio en Breslau.

Rilate al la artikoleto en ET 222 oni informis nin, ke la esp. kurso, komencita ĉe la stacio en Breslau je la fino de junio, daŭris 20 semajnojn (gvid. pasira konsilanto Ed. Becker, kaj ke nun okazas perfektiga kurso (gvid. mezlerneja dir. Driesler) ĉiulunde vespere 7.30—8.15 h. MET sur ondo 418. Oni do vidas, ke la breslaj samideanoj ne estas kulpaĵ pro la neinformiteco de la direkco de „Schlesische Funkstunde“.

Itala Radio-revuo

„Radiofonia“ (Roma, Via della Vite 41, aŭ Casella Postale 420) skribas:

„Seriozaj kaj interesaj fakuloj kaj simpatiantoj al Esperanto kaj al Radio estas petataj mallonge skribi al Radiofonia, sciigante ke ili pledas por kiel eble plej baldaŭa enkonduko de Esperanto en radiosferoj.“

Kutime la stacio elsendas ĉiuvespere je proksimume 7.40—9.40 h. holanda tempo = 7—9 h. MET kaj estas bone aŭdebla ankaŭ en nia lando (Holando). G. v. H.

povis: li estis tro konsternita. Poste, aŭdinte, ke tio daŭros nur kvar semajnojn kaj kostos nenion, li iom trankviligis, kaj miro anstataŭis lian koleron. Fine li estis en la stato diri:

„Sed, Johano, sen mia permeso?“

„Ĥm, — respondis Johano — mi ja certe ne estus farinta tion, sed la profesoro estas bona via amiko. Mi diris al li, ke mi ne povas fari tion sen la permeso de mia sinjoro. Tiam la profesoro demandis: Kiu do estas via sinjoro? Mi respondis: Kriŝan Sempelman estas lia nomo, li studis leĝosciencon kaj estas tre saĝa. Jen la profesoro laŭte ekkris: Kiel, — Kriŝan Sempelman? Nu, li ja estas mia amiko de longaj jaroj! Mia kara Kriŝan! Kune kun Kriŝan mi sidus sur la . . . biereja benko, kune kun li . . .“

Mallaŭtigante sian voĉon Johano sin klinis al la orelo de sia sinjoro: . . . „Kune kun li mi kuŝis en la strata defluejo!“ — li murmuris. „Nu, nu, — intermetis Sempelman ruĝigante — tion li diris ŝerco, kaj efektive tio estas ŝerco, kvankam senrespekta. — Kiu do estas la nomo de l' profesoro?“

Komence Johano frapis per la manplato sian frunton, poste siajn genuojn . . . „Ĥm, kiu ja estis lia nomo? B . . . Per „B“ ĝi komenciĝis. Mi forgesis, sed mi memoros. . . jen . . . nu, indiferente! Li diris: Alportu miajn salutojn al li, — Kriŝan Sempelman ne koleros, li certe konsentos. Post kvar semajnoj li ricevos sian hundon, kaj kiam li ĝin ricevos!“

Kion povis fari Sempelman? Li konsentis: Studadu Hektoro dum kvar semajnoj, — post kvar semajnoj mi ĝin revidos, — diris li al si. — Pasis kvar semajnoj.

„Memoru pri Hektoro!“ — kiris post li la sinjoro, kiam Johano refoje veturis urbon.

Sed Johano revenis sen Hektoro. Li tuj iris al la sinjoro: „Vere, sinjoro Sempelman, vi estos prava, se vi riproĉos min kaj la profesorojn. Ankaŭ mi dum la tuta vojo riproĉis min kaj la profesorojn. Ili superforte agis kontraŭ mi; mi ne sukcesis repreni nin Hektoron. Hektoro —

* Ĉi tiu poeto germana (1844—1918) amis profunde sian patruŝtaton kaj precipe la lokon de sia naskiĝo: Slesvigo-Holstein. Li skribis multajn novelojn kaj romanojn el la medio de l' vivo kamparana, perlojn en la germana literaturo. La ĉi-supra ŝercrakonto pravas brile lian humoron. — Profesie li estis supera juĝisto. — La 29-a de novembro Germanujo memore festis la 80-an datrevenon de lia naskiĝo. (Rim. de l' trad.)

Esp. Radio-Kalendaro.

Lau peto ricevita de diversaj flankoj ni donas
eti-sube liston de radio-stacioj, kiuj regule
disaŭdigas esp. kursojn, paroladojn, kantojn ktp.
Dimanche. Tgm. 12.00-12.10 h Königs-
wusterhausen, ondo 2800: Esp. programo.
Lunde. Ptm. 4.45 h Hamburg, ondo 395:
Dek minutoj da Esperanto. (S-o Minor.)
Vesp. 7.50-8.15 h Breslau, ondo 418:
Perfekta kurso. (Mezlerneja dir. Driesler.)
Merkrede. Vesp. 9.20-9.50 h Lyngby-Radio
Köbenhavn, ondo 2400: Esp. arango. (S-o
Lendorff.)
Jaude. Vesp. 7.50 h München, ondo 485:
Esp. kurso. (S-o Koch.)
Vendrede. Vesp. 6.50-7.00 h Frankfurt,
ondo 470: Esp. kurso. (Insir. Urban.)
Sabate. Ptm. 4 h Berlin, ondo 505: Esp.
kurso. (Dir. Glück)
La tempoj donitaj signifas MET (Mez-Eŭropa
Tempo).
Se ekzistas aliaj stacioj, kiuj regule disaŭdigas
esp. kursojn, paroladon, kantojn ktp., ni tre petas,
tion sciigi al nia redakcio.

Kroniko.

Por servi nian legataron per ĉiam aktualaj, fidaĵinda kaj kompleta
informaro, ni bezonas sciigojn (sur postkarto aŭ aparta foleteto unu-
flanke skribita, sed ne inter administraci aŭ privata sciigo) pri ĉiu
novaĵo el la esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidele, legeble
(precipe nomi).

Aŭstrio.

AED-konferenco en Graz.
La ĝenerala Esperanto-organizaĵo en Aŭstrio estas
AED (Aŭstruja Esperanto-Delegitaro). Jam antaŭ la milito
ĝi vigle laboris. Sed estis malfavora sekvo de la dispec-
igo de malnova Aŭstrio, ke plej viglaj partoj de AED
estas forprenitaj. Tial daŭris longe, ĝis ĝi povis esti re-
organizata. Tamen nun pro la bona influo de la XVI-a ebl-
iĝas propagando en pli eika formo. Por celkonscie kaj
en kolekto de ĉiuj fortoj eluzi la situacion okazis nun
en Graz la 7 decembro konferenco, vizitita de multe da
delegitaroj. Akurate oni raportis pri la nuna stato de la
movado kaj priaroj taŭgajn paŝojn por iom post iom
oficialigi Esperanton en Aŭstrio. La tre serioza pritraktado
de ĉiuj nunaj fakoj rajtigas la esperanto, ke en la venontaj
monatoj venos rimarkindaj sukcesoj.

Britujo.
Manchester. Fondiĝis grupo de SAT.
Ashburton. Devon. Je 27. 11. s-o W. R. Wood
faris ĉe Ashburton Mutual Improvement Society lumbildan
paroladon: „Kielĉaj Aspektoj de la Lingva Problemo“.

Ĉeĥoslovakio.
Gablonz. Fondiĝis lab. grupo kun 18 p. Kurso
komenciĝis kun 25 p.

Germanujo.
Leipzig. La lab. grupo Leipzig instruas, laŭ „Sen-
naculo“, nuntempe 700 p. en 84 kursoj; la duono estas
sportuloj.

M - Gladbach. Komencis kurso por ĝeinstruistoj
kun 15 p., gvid. instr. Paul Brendgens el Rheydt.
Wickede-Asseln b. Dortmund. S-o W.
Kocksemper gvidas esp. kurson kun 14 p.
Meissen. Okaze de la zamenhofa naskiĝtago aranĝis
la Meisena Esp. Klubo varbukvenon kaj ekspozicion,
kiuj estis bonege vizitataj, ankaŭ de reprezentantoj de la
gazetaro. S-ano Sohrmann el Weinböhla faris prop. parol-
adon, kiu sekvis diskuto. Poste kunesto en gaja rondo.

diris la profesoroj — estas hundo... saĝa,
netakseble saĝa! Ĝi devas daŭrigi la studadon, —
poste ĝi fariĝos eminentulo. Fakte, ne estis
fareble ĝin nun forpreni!“

Tio nepre ne plaĉis al Simpelman:
„Kiajn aferojn vi faras, Johano!... Estas
vere tro malsaĝe!“

„Estas, — konfesis Johano. — En ia rilato,“
— li aldonis.

Ĉi tiu konsento, kvankam limigita, havis kviet-
igan efikon:
„Ĉu ĝi do lernis ion, ĉu ĝi jam scias silabi?“

„Ĉu silabi? — diris aŭ pli ĝuste kriegis
Johano, — ĉu silabi? Eble nur silabi? Rezoni
ĝi scias kiel advokato kaj prediki ĝi scias kiel
pastro! Kaj kiel konvene ĝi kondukita! Sed
ĉetere tute afable kaj simple! Je la fino mi
diris al ĝi „Vi“. Ĝi alparolis min per „Johano“
kaj „ci“ kaj petis informojn pri ĉiuj. Klere ĝi
parolis, sed ankaŭ jargone ĝi scias babili.“

„Al la scienco — ĝi diris al mi — mi sentas
fortan inklinon, tio estas valora. Studadi estas
por mi la plej granda plezuro.“

Kaj montrante siajn librojn ĝi diris: „Jen mia
felikiĝo. — Mi estas kuraĝa kaj nur malofte min
kaptas hejmevo. Sed la lastan noktmon ti tamen
multe ploris, mi konstante memoris pri nia bona
Simpelman.“ — Sufiĉe, — Hektoro viŝis siajn
okulojn.“

„Kiel, — ĝi viŝis siajn okulojn? — demandis
Simpelman kun miro — do per kio?“

„Nu, — respondis Johano — per sia antaŭa
mano.“

„Hm, tiel... per sia mano“ — Simpelman
ekmiris.

„Bonan vivon havas nia Hektoro,“ — re-
komencis Johano. — Ĝi mangis ostan supon kun
rizo kaj buloj, kaj krom tio ĝi trinkis ruĝan
vinon.“

„Kiel, — ĝi trinkis ruĝan vinon?“

„Jes, ruĝan vinon...“

Italujo.

Brescia. S-ano G Facchi gvidas kurson ĉe Insti-
tuto Prof. Moretto kaj alian kurson ĉe kultura Asocio
Circolo Filologico, al kiu aliĝis lernantoj el diversaj ler-
nejoj. — La ejo de loka esp. grupo estas ĉe Circolo Filo-
logico.

Fulda. Du novaj kursoj komenciĝis: unu en la
ĝimnazio kun 20 lernantoj kaj unu en la popol-universitato
kun 48 p., inter ili kelkaj ĝeinstruistoj; gvid. studkons. D-o
Westenberger.

Polujo.

Warszawa. Vesperaj komercaj kursoj de Sekulovid
enkondukis Esp. kiel devigan objekton, instruas nia poeto
Leo Belmont. La instruon iniciatis s-o A. Zambijcki, red-
aktinto de „Voĉo de Farmacistoj“.

Krzesmieniec. Ekzistas 8 esp. grupoj: „Rogaŭko“,
8 p.; „Piezno“ (?), 10 p. (estontaj pioniroj de hebrea
lando); kaj „La juna ĝacolorbo“ (? ?), skolta grupo. — (Manu-
skripto apenaŭ legebla.)

Ido.

La V-a Int. Ido-Kongreso estas okazonta en Torino
(Italujo) la 5.-8. 9. 1925.

Novaj Ido-kursoj komenciĝis, laŭ „Germana Idisto“,
dum la lastaj monatoj (okt.-nov.) en Germanujo: Chem-
nitz (5 kursoj, ĉ. 50 p.), Frankenburg (11 p.), Kassel (14 p.),
en Luksemburgo: Eitelbrick, Luxemburg (20 p.); en Svislan-
do: Luzern (2 kursoj, 56 p.); enite 8 kursoj kun ĉ. 150 p.
en 6 lokoj. Se tio estas la tuta rikolto de la vigla propa-
gandado, la praktika mondlingva movado vere ne bezonas
timi.

Esperantida.

Ni ricevis ekzempleron de „Fundamenta Krestomatio“
de la int. lingvo Esperantida kaj ekzempleron de duaĝa
gazeteto „Esperantida“ (sept.-okt.); ĝi enhavas leteron de
Antido al la Prez. de la Ida Akademio, en kiu li akcentas
la superecon de la strukturo de Esperanto super tiun de
Ido.

Bibliografio.

Libroj.
Proletaria kantarino. Sennacieca Asocio Tutmonda. E-
ldone kooperativo Dusseldorf-Leipzig. 12: 18 cm, 180
paĝoj. Prezo por bonvolantaj landoj 6 sv. fk., por mal-
bonvol. landoj 5.— ormk.

Rimarkinda eldonaĵo, kiu enhavas 74 nuntempajn
kaj ĝisintepokajn batalkantojn revolucionajn, montrante la
vivecon de proletaria batalo tutmonda kaj la unuecon
de la revolucia ideo. Elĉerpiĝe el 22 nacilingvaj prolet-
kantaroj aŭ laborist-esperantistaj kantarinoj, la kantoj
estas komprenebligataj rilate al statoj, kondiĉoj kaj
medioj, sub kiuj ili estis verkita. Teksiverkistoj, kom-
ponistoj kaj traduktintoj ĉiam estas nomataj. Pro tio la
verketo estas utila ne nur por la proletaro, kantanta
„fortig' senton de soldateco, de kunececo, de sennacie-
eco“, sed ankaŭ por la muzikemuloj kaj muzikistoj, tro-
vontaj ĉu la kulturo pasas antaŭen? La rolo de l'
hipokriteco, de l' seninteligenteco kaj mallerkede de la
kultiva moralo. La moralo por si mem. Instruistoj
kaj lernantoj. La unuigitaj Statoj de l' mondo (kultur-
programo). Kiamaniere la homa libereco povas esti
organizata? — La plej grava parto de la verko certe
estas la kvina: la unuigitaj Statoj de l' mondo. La
aŭtoro ekzamenas ĉi-loke multe da demandoj, kiuj al li
ŝajnas have pli grandan gravecon por la stato de la
kultura socio. Al ni esperantistoj estas precipe interesa

Der Weg zur Kultur. (La vojo al kulturo.) De Prof.
Dr. August Forel. Anzengruber-Verlag, Wien 1924.
18 1/2: 25 cm, 165 p. Estas kolekto de jam antaŭe aper-
inaj verketoj de la verkisto, koncize dividita je ses
partoj. Ĉu la kulturo pasas antaŭen? La rolo de l'
hipokriteco, de l' seninteligenteco kaj mallerkede de la
kultiva moralo. La moralo por si mem. Instruistoj
kaj lernantoj. La unuigitaj Statoj de l' mondo (kultur-
programo). Kiamaniere la homa libereco povas esti
organizata? — La plej grava parto de la verko certe
estas la kvina: la unuigitaj Statoj de l' mondo. La
aŭtoro ekzamenas ĉi-loke multe da demandoj, kiuj al li
ŝajnas have pli grandan gravecon por la stato de la
kultura socio. Al ni esperantistoj estas precipe interesa

„Nu, tian lukson ĝi devos ĉesigi post sia
revenoj!“
„Jes, se tio povos esti farata.“
„Devos! — decidis Simpelman grateante sian
kapon. — Kvar pliajn semajnojn tio daŭru, sed
poste Hektoro revenu hejmen.“
Pasis plia monato.

Por la venonta vojaĝo Johano ricevis ordonon
nepre plenumotan.
Johano revenis sen Hektoro.

Li havis aspekton de konfesema krimulo.
„Sinjoro, sinjoro, kian opinion vi havos pri
mi! Sed aŭskultu... aŭ ĉu vi ordonos... ?
En tiu ĉi okazo mi tuj reiros. Do ne koleru min!
Vere, reŝis por mi nenio alia!“

Simpelman murmuris: „Kion mi ekscios ĉi
tiun fojon?“
„Nenion bonan, sinjoro. Hektoro rifuzis
reveni. Hektoro decidis daŭrigi la studadon dum
sia tuta vivo. La profesoroj diris al mi, ke Hek-
toro estas pli saĝa ol ili mem; ĝi nepre devas
fariĝi profesoro, oni jam vakis por ĝi katedron
profesoran de... estis io per „fi“... de...
de la fi-lozofio... jes tial estis... de la fi-
lozofio.“

Ekindignis Kriŝan Simpelman: „Al kiu apart-
tenas Hektoro, ĉu al mi aŭ al la akademio? —
li ekcriis. — Ĝi tuj revenu hejmen... en ĉiuj
cirkonstancoj!“

„Jes, — respondis trankvile Johano — mi jam
pensis, ke tion vi diros. Mi do tuj ekiros, por
rekonduki ĝin. Mi pripensas, kiamaniere tion fari.
Sen polico mi kredeble ne sukcesos, same ne
sen malagrablaĵoj kaj ĉagrenoj.“

„Kiel, — malagrablaĵoj kaj ĉagrenoj?“ — de-
mande ripetis Simpelman.

„Jes, sinjoro... bedaŭrinde... bedaŭrinde!
Ĉar Hektoro jam ne estas la ĝisnuna Hektoro.
Ho, bona Dio! — Kio fariĝis nia Hektoro!“

Mallaŭtigante sian voĉon Johano alpaŝis tre
proksimen:

la demando pri internacia mondlingvo. Aldone la aŭtoro
diras pri Esperanto: „Ĝi bazas sur la ĉie plej uzataj
radikoj kaj havas s-mpegajn fonetikan, gramatikan kaj
sinteksan strukturon.“ Kaj pri „la harmonia lingvo“
rilate al Ido li diras: „La konkurencio kaj jaluzo de
ambaŭ lingvoj estas tiam pli bedaŭrinda ke la kunfando
estus facile farebla.“ La germanlingva skribita verko
certe estas ĉiuparte legebla kaj atinda. H.D.

Gazetoj.

Katolika Mondo, nov.-dec. Laŭ la raporto pri la Ika-Kon-
greso en Lugano ŝajnas, ke la Ika-movado, iniciata de
esperantistoj, pli kaj pli transiras en la manojn de ne-
esperantistoj, kio de esp. vidpunkto estas tre bedaŭrinda.
Adreso: Zug, Svlando.
Sennaculo 11. 12. Interesa artikolo pri interjuvo kun k-do
Purcell de la Brita Sindikata Delegitaro en Moskva.
Le Monde Esperantiste Paris, sept.-oktobro. Aperas kun
granda malfruigo. Legante L.M.E. oni devas kapskui.
Kaj sur la titolo staras la vorto „Propagando!“ Ĉu p-o r
Esp. ? Ni dubas.

Gazetaro.

L'Index des Industries du Cuir, Paris, dec. Indekso i. a.
en Esp.
Schweizerische Post-, Zoll- und Telegraphen-Zeitung, Bur-
gordf, 4. 12. Granda art. por Esp. de D-o Spielmann.
Bankbeamten-Zeitung, Berlin, 30. 11. Art. „Esp. im Bank-
verkehr“ de K. Fischer.
Magdeburger General-Anzeiger, 7. 12. Pri Kongreso de
Wien.
Der Deutsche Rundfunk, Berlin, 14. 12. La ĉiam interesa
kaj rice ilustrita radio-revuo kun daŭrigo de la esp.
kurso de s-o Behrendt.
Radio-Welt, Wien, 22. 11. Art. „Esp. la mondhelpingvo
de Radio“, de A. R. Burrows, dir. de B. B. C. London.
Lark, Charkov, 30. 11. Esp. kurso.

En kiuj urboj ekzistas
„Zamenhof“-strato?

Varsoviaj samideanoj intencas turni sin al la
varsovia urba konsilantaro kun peto nomi la
straton, kie loĝis nia Majstro, Zamenhofstrato.
Estus laŭcele, se ni povus prezenti al la urb-
estraro oficialajn dokumentojn kun fotografiaĵoj
de urboj, kie jam ekzistas Zamenhofstrato. Tial
ni petas sendi kernajn sciigojn, fotografiaĵojn
ktp. al s-o Ad. Oberrotman, Krak-Przedm. 10,
Warszawa, Polujo.
Aliaj gazetoj bonvolu represii kaj sendi kopion.

Danko.

En somero ni aperigis alvokon por kolekti
donacojn por subteni la infanojn de malriĉaj
rejnlandaj poŝtofiscistoj.
Entute ni ricevis 495 gmk.; pri la sumo ni
sistateme kvitancis. Unu donacinto, kiu sendis
400 mk., postulis, ke estu konsiderataj ankaŭ
infanoj de nepoŝtistoj. Do ni povis komence
de aŭtuno subteni 14 personojn, 7 poŝtistojn kaj
7 nepoŝtistojn; ĉiu ricevis sumon de 30-45 mk.
laŭ bezono kaj laŭ nombro de familianoj.

La surprizitaj patroj petis nin, esprimi al la
donacintoj ilian plej koran dankon.

Intence ni atendis ĝis aŭtuno, por ke la fami-
lioj povu aĉeti hejlilojn aŭ terpomojn por la
vintro.

La originalaj kvitancoj kaj la aktoj pri la
disdonado estas je dispono. Refoje ni dankas
la donacintojn pro ilia afabla helpo.

Conr. Creter, Grete Allendorf, Thoma,
poŝtinspektoro, sup. poŝtsekretario.

„Estus eble bone, sinjoro Simpelman, — laŭ
mia opinio — se restus la hundo, kie ĝi nuntempe
estas. Ĉu vi permesas al mi paroli?“

„Kion do?“

„Mi suspektas, ke Hektoro kutimigis al drin-
kado. Hodiaŭ almenaŭ ĝi estis ebriga kaj kvazaŭ
freneza. Ĝi min invitis eniri ĝian ĉambron.
Ĉu vi scias, kion ĝi tie diris? Preskaŭ mi ne
kuraĝas tion ripeti al vi; ĉar drinkulo kaj mal-
bonulo estas Hektoro. Ĝi diris subite: Kiel fartas
Kriŝan Simpelman, tiu maljuna pekulo? (Per tio
ĝi celis vin!) Ĉu tiu grandaĵulo ankoraŭ tiom
ŝatas la inojn?“

Ĝis nun Kriŝan Simpelman aŭskultis starante.
Kiam Johano diris ĉi tion, li korpremite ekdisis.

„Jes, — daŭrigis Johano — tiel parolis Hektoro.
Kaj plej ĝi diris: Ĉu la maljunulo ankoraŭ tiom
persekutita la malgrandulinon, kiu preigas por li
la tolejojn, — ĉi scias, la etan ĉarmulinon Dorinjo,
— ĉu li ankoraŭ tiom amindunas ŝin? —
Jen mi ekkoleris. — Hektoro — mi ĝin riproĉis —
ne decas, elpensi tiajn mensogojn! Nia maljuna,
respektinda senharulo, — mi volis diri... nu,
vi jam scias, kion mi volis diri; — sed ĝi ne
lasis min fini... Hektoro ekcriis: Silentu,
silentu! Respektinda senharulo? — Hektoro ek-
redigis, ĝi perdis preskaŭ la voĉon pro ridado.
Se vi estus aŭdinta, kiel ĝi ridis!... Reakirinte
la spiron ĝi ekblekigis: Kiel, — mensogoj? Belaj
mensogoj! Mi diros al ci... la maljuna, respekti-
nda senharulo estas — vera malĉastulo!“

„Jen mi flame ekindignis, — daŭrigis Johano
— ĉar tio estis tro impertinenta, — jen mi ek-
koleris. Jen vi mem ekkoleris, — lasi diri al si
tiajn aferojn! — Profesoro Hektoro — mi ekcriis
— lasu diri al vi de la maljuna, honesta Johano:
Tio ne sole ne decas, tio estas kanajlaĵo, mal-
noblaĵo! — Mi preferus demandi mian langon, ol
diri ion tian pri mia sinjoro. Kaj ĉio „elsuĉita el
la piedoj!“ Profesoro Hektoro, mi dezirus, ke vi

*) Komika ŝanĝo de la germanismo: „Ion suĉi el niaj
fingroj“, kiu signifas: „Aserti ion fiktitan, prenitian el la
propra fantazio.“

Rim. de l' trad.

Esperanta Ligilo

la lumo de niaj sendividaj gefratoj.
Sindonaj gesamideoj, dum pia kristnaska festo, memorante la naskigon de nia Savinto, lumigante de la humiluloj, lumigu la koron de niaj sendividaj gefratoj.

Dankeme akceptas oferojn: Honora Kasisto de „Esperanta Ligilo“: S-o W. P. Merrick, Penso, Shepperton, Anglujo, aŭ la Redakcio de ET.

Peto.

Havante rilatojn kun influaj personoj en Polujo, per kiuj mi deziras poresperantigi la estraranojn de Polujo, mi petas sendi al mi po kelkaj ekzempleroj de div. esp. eldonaĵoj, speciale politikaj, naciaj, sociaj ktp. pruvantaj, ke Esp. estas uzata en la servo porŝtata kaj pornacia. — Prof. L. Kronenberg, Bydgoszcz, Polujo.

La venonta numero de ET

aperos kiel 6-paĝa kristnaska numero la 20. 12. — La numero de 24. 12. estos kufima 4-paĝa numero. La sabaton post kristnasko (27. 12.) ne aperos numero. La lasta decembra numero aperos la 31. 12. Poŝtabonantojn ni atentigas tute speciale pri la nova titolo post novjaro „Heroldo de Esperanto“.

Leterkesto.

M. D. en Paris. Dankon por afabia letero.
T. II. en Mantova. La dezirita adreso: Rudolf Hoschek, Wien 17, Müglendergasse 6.

Trimonata Gazeto Esperanta

Literaturo

La plej bonstila kaj interesa gazeto por spertaj kaj spertigantaj esperantistoj.

Enhavas bonajn tradukojn kaj originalaĵojn ktp. — Konigas ĉefverkojn el literaturo de diversaj landoj, popolarakontojn, dramojn, poezion.

Petu specimenan ekzempleron de **B. E. A., 17 Hart St., London, W. C. 1.**

Abonpago por unu jaro 2 ŝilingoj (2 1/2 sv. fk.) afrankite.

Sendu por katalogo de esperantaj libroj senpage.

neniam estu lerninta uzi la lingvon, — tio ja estas tro malsaĝa, — tiel makuli la honoron kaj reputacion de nia bona sinjoro . . . !

„Kiam tio ĉi elpuŝiĝis, el mia koro, — daŭrigis Johano — Hektoro fariĝis serioza kaj malebria kaj ne ridis plu. — Johano — ĝi diris al mi — tio estis gravaj vortoj! Sed mi pardonas al ti, ĉar tion ĉi faris bonintence. Ĉi estas homo. Kontraŭ homoj oni estas singarda. Sed mi estis hundo, kiun oni ne atentis. Mi certigas vin, ke mi vidis, kion mi diris, kaj mi povas pruvi, kion mi diris.“

Kriŝan Sempelman rigardis siajn piedojn, lia mano, kuŝanta sur la tablo, komencis tremi.

Kvazaŭ ne rimarkante tion — Johano rakontis plue:

„En pasinta tempo — diris Hektoro — Kriŝan Sempelman asertis, ke mi estas pli saĝa ol vi ambaŭ; mankas al mi — li diris — nur la kapable paroli. Nun mi kapablas paroli kaj kiam mi revenos hejmen, li ion aŭdos, . . . ekzemple . . .“

Johano uzis sian manon kiel parolotubon.

Kriŝan Sempelman devis toleri, ke oni blovis en lian oreilon la plej abomenajn kalumniojn, kiujn lam hundo elpensis.

„Sufiĉe! — li diris farante energian geston de rifuzo — ebriga hundo povas rakonti multon!“
„Oni povus esplori“, — ĝemis Johano kun okuloj malsekaj pro kortuŝo

Kriŝan Sempelman tamburis nerve per la fingroj la tabloplaton, je la komenco forte, poste malpli forte, je la fino tute malforte. Tiam li ne tamburis plu kaj leviginte apogis sian manon sur la tablorandon.

Jen li staris rekta kaj solena . . .

„Ĉu propran katedron de la filozofio? — li demandis. — Ĉu vere Hektoro fariĝos profesoro?“

„Jes, eĉ tre kapabla kaj regula“ — certigis Johano.

La dekstra mano de Kriŝan Sempelman serĉis la elbranĉojn de la veŝto: Lia tuta persono estis kvazaŭ digno kaj favoro:

LA KOLPORTISTO

Oficiala organo de Esperanta Kolportista Asocio.

Dumonata, Senpaga. Ekaperos januaro 1925.

Celo: La Kolportisto celas prezenti la Evangelion de Amo kaj Kristanismon spiritan sen dogmoj, sen ritoj. Samtempe ĝiaj paĝoj estos liberaj al ĉiuj, kiuj havas mesaĝon por proklami

Skribu por ekzemplero (senpaga) al **ESPERANTA KOLPORTISTA ASOCIO**
64 St. Thomas Rd., London North 4.

Tra la mondo.

Maneskribata internacia rondiranta ĵurnalo. La ĵurnalo estas plej efika rimedo por subteni konstantan intereson al la lingvo en komencantoj, gekursanoj, ĝeĵunuloj, infanoj. Ankaŭ ĝi estas rekomendata al ĉiu samideoano, kiu deziras perfektigi en Esperanto, ankaŭ al skribemuloj, verkistoj, tradukistoj, kiuj ne havas eblon ial vidi siajn artikolojn presitaj. — En ĉiu kajero partoprenas dek samideoanoj de malsamaj landoj. — En ĉiu kajero estas problemoj, konkursoj kaj aliaj interesindaĵoj kun multaj valoraj premioj. — Jam en multaj landoj la ĵurnalo havas grandan sukceson! — Partoprenantoj de la ĵurnalo enskribas en kajerojn ricevitaĵajn siajn artikolojn originalajn aŭ traduktajn, aŭ versaĵojn laŭ sia plaĉo kaj elekto, faras notojn kaj korektojn en artikoloj jam enskribitaj kaj cet. — Abonjaro komenciĝas de kia ajn dato. — Jara kotizajo estas 1 amerika dolaro. — Gekursanoj, anoj de esp. grupoj, familianoj kaj cet., aliĝante ope — pagas 1 amer. dolaron + 0,20 de dolaro por ĉiu plua partoprenanto. — La kotizajojn oni sendu en leteroj rekomenditaj (en amer. dolaroj aŭ en bankbiletoj de sia lando laŭ taga kurzo de amer. dolaro) al la administranto de la ĵurnalo: S-o F. Krämer, Lehrer, Annaberg, Erzg., Germanujo. — Pluaj detaloj estas riceveblaj de la administranto kontraŭ unu respondkuponon. — Detala regularo por partoprenantoj estas en ĉiu kajero de la ĵurnalo.

Gvidlibro tra Salzburg.

Tiu ĉi ilustrita 52-paĝa broŝuro scigas pri la vidindaĵoj de la famkonata Mozart-urbo kaj pri la naturaj mirindaĵoj de la ĉarma alp-landeto Salzburg kaj enhavas notojn pri la disvastigo de Esperanto en ĝi.

Mendebila ĉe **Ellersiek & Borel, Berlin S. W. 61.**

Prezo: 50 fenigoj.

„Gardu min Dio, ke mi rulu ŝtonojn al mia Hektoro kontraŭ la radoj!“ Mi komprenas, mi pardonas. Estu konservata Hektoro por la Scienco!“

Maldekstre de la fabela lando, malantaŭ la urbo, trans la erikejo, post la arbaro — jen loĝas Kriŝan Sempelman. Li studis logosciencon, sed rezignis sukcesi en ekzameno sole, por ne hontiĝi la profesorojn.

El la germana: Zanoni.

* Germanismo, kiu signifas: „ke mi malhelpu la karieron de . . .“ Rim. de l' trad.

Diversaĵoj.

Primitiva disaŭdigo (Broadcasting).

Oni ĉiam interesiĝas pri la metodoj, kiujn oni uzis dum la epokoj por disaŭdigi novaĵojn gravajn.

Hodiaŭ, kiam la senfadena telegrafado malgrandigas la interspacojn, specon de sistemo miniatūra uzas la putomajaj indianoj de Sudameriko. Oni metas du bambuaĵajn stangojn, flanko ĉe flanko, sur la plankon, kaj supre du aliajn krucoforme. La sendaĵojn oni elfrapas en putomaja kodo, kaj ili transsendiĝas per la tero al la plej proksima aŭskultejo.

En Sudafriko sendaĵoj signaligis per tamburoj, el ŝelo faritaj, kaj kiam oni frapas sur ili, estas eble aŭdi la frapetojn por multajn kilometrojn. Per ĉi tiu metodo la venko de Sir Redvers Buller ĉe Kolosen (Colosen) sciĝis al enlandanoj por ĉirkaŭ naŭdekkvin kilometrojn dum la daŭro de du horoj.

En antikvaj tempoj oni ĝenerale uzis la fajron por doni averton pri minacanta invado. De la marbordo al ĉiu distanco enlandan starigis fajregoj ĉe ĉiu montepinto. Ĉi tiujn fajregojn lumigis observantoj, kiam ili vidis la avertantajn signal-fajrojn ĉe la marbordo ekflami. Tiel „de mont' al mont' signalo flugis“, kaj per ĉi tiu metodo sin armis la landanoj por kontraŭstari la invadantojn.

El „TIT-BITS“ trad. Leslie E. Thomas.

Eldonejo

„Esperantista Voĉo“

(posedanto: Salo Grenkamp Kornfeld)

Jasio (Pollando)

representanto por Polujo de firmao Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig, Hungara Esperanto Instituto, Budapest ktp.

Liveras ĉiujn esperantajn librojn. Al konstantaj mendantoj ni konsilas malfermon de konto ĉe ni. Postulu prezaron!

Ni rekomendas inter aliaj:

Balucki, Ama bileto	0.25
Elsk ka Eska, Unuaj agordoj	0.50
Grenkamp, Krijoj de l' koro	0.25
„ Penseroj, 1 a kajero	0.25
„ Il a kajero	0.40
Kabe, Internacia Krestomatia	2.—
Mickiewicz, Sinjoro Tadeo	5.—
„ Improvizacio de Konrad	0.25
Orzeszko, A. B. C.	0.25
Wyslouch, El la lando de ruinol.	0.50

Prezoj en svissaj frankoj.

Por la sendkosto oni aldonu 10% de la pagota sumo, minimume sv. fk. 0.40.

Ni serĉas interrilatojn kun ĉiuj esperantaj librojraj kaj volonte ilin reprezentos en Polujo.

Anoncetoj.

Anonceto (nur akceptataj por minimume du sinsekvaj impresoj) kostas po du impresoj kaj po 30 vortoj egvalvalor de 1.30 sv. fk. — Anonceto pri korespondo kaj interŝanĝo kostas po du impresoj kaj po 15 vortoj (krom unu adreso) egvalvalor de 1.30 sv. fk. — Anoncetoj pri esperantista vivo (naskigo, fianĉigo, edziĝo, morto, okazaĵoj gravaj esp. kunveno, paroladoj, festoj k. s.) estas senpagaj (unufola impresoj). — Anoncetoj devas alveni 8 tagojn antaŭ aperado.

NASKIĜO. Al la gepatroj de s-ano M. Zjomek en Krakov, Polujo, naskiĝis filino Janina. [2]

HELPLI BONKORULOJ! Mi havas en manuskripto grandan originalan romanon „Sen titolo“, kiun mi cedos malĉare al ĉiu, kiu helpas al mi mone daŭrigi edukadon de miaj infanoj en la urbo. Skribu al J. Sirjaev, Baklanka, gub. de Volgoda, Rusujo. [2]

Koresponde kaj Interŝanĝo.

Skribu al ni ĝis 1. 1. 1925, se vi ne ricevis respondon de anoncinto al via registrita sendaĵo aldonante nomon de nerespondinto kaj daton de via propra sendaĵo. Ni volas provi, malhelpi tiun fiagadon — la nerespondadon de anoncintoj.

Bazilo Averin, Rusujo, Astrahani, Poŝtkesto 14, Filat, regna bileto N-o 165 „ĉerez Upolnomoĉennogo v. Moskov. Tverskoj bul. 12.“ Interŝanĝo PM kaj papermono. (Ne sendu germanajn kaj ĉeĥoslovakajn PM!) Sendu kvankam 1000 pecojn sed ne sendu pli ol 10 pecojn de la sama speco, alle oni konfliktos vian sendaĵon! Mi respondas ĉiam. [1]

Fraŭlo, poŝtovicisto, 21 jara, deziras interŝanĝi per il. PK kaj L kun gesamideoanoj. Bonvolu skribi, nepra respondo! Latvijo, Rujene, Pasta Kantori, Jaunbrai. [2]

Heibronn a. N. (Germ.) La Esp. grupo serĉas ankoraŭ kelkajn gekorespondantojn el ĉiuj landoj. Ĉiam kaj tuj respondos: il. PK bil. Oni turnu sin al la prezidanto s-o Fr. Bachmann, Bahnhofstr. 5-l. Heibronn a. N. (Germ.) [5]

F-ino deziras korespondi per il. PK kun ĉiujlandoj. Preferas negermanlingvanojn. Julia Zimmer, Wien II., Schreygasse 8, (Vieno, Aŭstrio). [2]

S-o Ruda Ventura deziras korespondadi kaj interŝanĝi PK, L kun seriozaj gesamideoanoj de ĉiuj landoj. Certe respondos. Rnda Ventura Letna apud Pizeŝ, post Lobez. [2]

F-ino Jara Brandys, Praha-Smichov, Ĉeĥoslovakio Hoteĉková 668-43, deziras korespondi kaj interŝanĝi PK kun tuta mondo. [2]

S-o Seitaro Matsuba Tanabe, Kii, Japanujo, deziras korespondi kun esperantistoj kaj esperantistinoj en la tuta mondo, speciale kun ĝeinstruistoj kaj profesoroj. [2] Estimataj Samideoanoj! Bonvolu ŝelĝi, ke de nun mia nova adreso estas: Győr, Apáttúrca 3, Hungarujo, Georgo Steiner. [5]

S-o Theodor Mathiae, Bochum, Wimmelhauserstr. 24, Germanujo, deziras korespondi il. PK, L kaj interŝanĝi PM kun gesamideoanoj al la tuta mondo. [2]

Atentu filateliste! Se vi interŝanĝis per la belegaj poŝtmarkoj de la libera urbo Danzig, tuj turnu vin al mi! Mi preskaŭ donacas ilin al vi. 100 diversajn danzigajn PM. kies katalogo valoro estas ĉ. 18 sv. fk. mi liveras kontraŭ 5 sv. fk. aŭ samvaloron. 125 diversajn danzigajn PM (katalogo valoro ĉ. 25 sv. fk.) kontraŭ 1 dolero aŭ samvaloron. Ĉiuj PM laŭdezira stampitaj neuzitaj. Por poŝtelspezoj (rekomend-letero) donu 2 resp. kup. aŭ samvaloron. Adalbert Noch, Danzig, Johannissgasse 67. [2]

F-ino Irena Petrauskaitė deziras korespondi kun la tuta mondo. Joniskėlis, Birzu ap., Litovujo. [2]

S-o Josefo Prouza, Āakovice 29 u Prahy, Ĉeĥoslovakio, deziras korespondadi kun tiumondaj samideoanoj kaj vice interŝanĝi PM kaj vidkartojn. Ĉiam respondos. [2] Anoj de Esperanto-grupo Eichwald apud Teplic-Sadanaŭ (Ĉeĥoslovakio) deziras interŝanĝi il. PK (bil.). Respondos certe.

F-inoj	Karla	Adam	n-o	181
	„ Mizi	Adam		181
	„ Anna	Müller		282
	„ Milli	Moula		289
	„ Resi	Schuster		212
s-oj	Richard	Schulze		164
	„ Martin	Bellmann, Mühlstr.	50.	[2]

Mi deziras interŝanĝon de PM kun ĉiuj landoj de mondo. Interŝanĝe proponas tutan Persujojn Bazo por interŝanĝo „Yvert et Tellier 1925“. Duplikatojn ne akceptas, ĉiam respondas, preferas konstantan interŝanĝon. Adreso: S-o D-o B. Korona, Banko Ruspers, Teheran (Persujo). [5] S-o Franz Peiter, Falkenau-Kittlitz n-o 21, Ĉeĥoslovakio, deziras interŝanĝi L, PK, PM escepte kun germanoj. [2] S-o Kurt Lösch, Chemnitz, Annabergerstr. 110, Germanujo, Mi deziras interŝanĝi il. PK kaj gazetojn kun ĉiuj landoj. Mi sendos nur belajn PK. Ĉiuj tuj ricevos respondujn. [2] Maksimiliano Ziemeck, Krakov, Polujo, strato de Vincentego Pola 5, deziras korespondadi kun ĉiulandanoj per il. PK. L pri scienco, ideo, esperanta movado, observo, interŝanĝi PK, PM fotografetojn, papermonon k. a. Respondo certa. [2]